

Esperanto U S

Bi-monthly bulletin published by the Esperanto League for North America ★ 2007/1-2
Dumonata bulteno eldonata de la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko ★ 2007/1-2

En la Numero

★ Kio novas en la Centra Oficejo?.....	2
★ Raporto de la Prezidanto.....	1, 4
★ Esperanto / NASK en NPR...5	
★ Project for local groups to promote Esperanto.....	5
★ Granda decido: Mi vojaĝos al Usono partoprenonte en NASK 2006!	6
★ Kiel organizi kongreson.....	7-9
★ Anonce.....	9
★ Kanalo al Klarpensado	10
★ Dialogo estas la Ŝlosilo al Paco en la Mezoriento.....	11
★ New from the Book Service.....	12-15
<i>Literatura parto:</i>	
★ Ĉe Ermito	16-17
★ Unu Sinjoro.....	17-18
★ Zenitko.....	19-20
★ Korespondi deziras	21
★ Kurackanto de la Indianoj Havasupajaj.....	22-23
★ <i>Recenze:</i> Pri praktika mistikismo – en Esperanto! ...	23
★ La Gepatra Lingvo kaj Esperanto: Nedisigeblaj Lingvaj Rajtoj de ĉiu Homo.....	24



Flago ĉe la LK, hotelo *Pueblo Amigo* en Tiĥuano

KOMPLEZE DE F. DORCIS

Raporto de la Prezidanto

Okaze de la sukcesoplena Landa Kongreso de ELNA/Esperanto-USA en Tiĥuano, Meksiko, la 27-30-an de julio, 2007

Saluton, karaj geamikoj!

La Kongreso

Kune partoprenis 97 entuziasmoj ĉe la hotelo *Pueblo Amigo*, kaj aliaj partoprenis en aparta baznivela kurso de Esperanto. La horaro sekvis la tradiciojn de multaj aliaj kongresoj: interkona vespero, solena malfermo, prelegoj, aferkunsidoj, raportoj, interesaj programeroj, distra vespero, bankedo, solena fermo kaj ekskursoj. Ni troviĝis en granda amikeco kaj vere internacia etoso.

(Daŭrigo sur p. 4)

Esperanto League for North America
PO Box 1129, El Cerrito CA 94530
USA/USONO

☎ 510/653-0998; 2510/653-1468

✉ elna@esperanto-usa.org

President/Prezidanto: Philip G. Dorcas
Vice President/Vicprezidanto: Steven D. Brewer

Secretary/Sekretario: Julie Spickler

Treasurer/Kasisto: Anna Bennett

Other Board Members/Aliaj estraranoj:
Joel Amis, Ĵenja Amis, D. Gary Grady,
Anjo Harlow, Lusi Harmon, Trevor
Andrews, Robert L. Read, Christopher
Zervic, Tim Westover.

Director, Central Office/Direktoro de la
Centra Oficejo: William Harris

Esperanto USA

Bi-monthly bulletin published by the
Esperanto League for North America
Dumonata bulteno publikigata de la
Esperanto-Ligo por Norda Ameriko
Vol. 45, No. 1-2 2007

ISSN 1056-0297

Editors/Redaktoroj: Joel Amis kaj
Ĵenja Amis

Layout/kompostado: Ĵenja Amis

✉ yevgeniya_amis@yahoo.com

Materials for **Esperanto USA** should be
sent to/Materialojn por **Esperanto USA**
oni sendu al:

Esperanto USA (Joel & Ĵenja Amis)

2025 Peachtree Rd. NE, #927,

Atlanta, GA 30309, USA/USONO

or by e-mail/aŭ retpoŝte al:

joelamis@yahoo.com

The opinions expressed in this bulletin
are those of the authors, and don't neces-
sarily represent the point of view of
ELNA or its bulletin/La opinioj esprimi-
taj en tiu ĉi bulteno apartenas al la
aŭtoroj, kaj ne nepre prezentas la vid-
punkton de ELNA aŭ ties bulteno.

Reprinting materials from this bulletin is
permitted, provided that due credit is
given, and a copy of the reprinted mate-
rial is sent to ELNA/Estas permesate
reaperigi materialojn el tiu ĉi bulteno,
kondiĉe ke oni ĝuste indiku la fonton kaj
ke oni sendu ekzempleron de la repub-
likigita materialo al ELNA.

Saluton karaj gesamideanoj!

Ni tre esperas ke vi ne tute rezignis iam
ajn denove vidi *Esperanto USA*-n! Ni tre
pardonpetas pro la malfruigo de la bulteno
ĉi-jare. Dum certa tempo nia vivo fariĝis
ege okupata — sed nun, feliĉe, aferoj
trankviliĝas. Ni iom post iom rekaptos la rit-
mon en tiu ĉi jaro (kio signifas ke vi eble
ricevos tri duoblajn numerojn, ekzemple)
kaj jam en 2008 la ritmo estos denove nor-
mala. Ni tre dankas pro via ĝisnuna pacienco!

Ne ŝokiĝu kiam vi sur la kovrilo de la venonta *Esperanto USA* rimarkos ke “Esperanto-Ligo por Norda Ameriko” mankos. Dum la ĵus okazinta ELNA-kongreso en Tihuano oni anoncis la rezultojn de la balotado: la membraro de ELNA aprobis la proponon ŝanĝi la ĉiutagan funkcinomon de ELNA al “Esperanto-USA” (bv. noti la streketon, malsame de la nomo de la bulteno). La jure oficiala nomo tamen restos ELNA.

La reago al la pasintjaraj literaturaj numeroj tiom superis niajn atendojn ke ni ankoraŭ havas literaturaĵojn! Pro tio ĉirkaŭ duono de tiu ĉi duobla numero konsistas el literaturo. Ni tre dankas al ĉiu kiu sendas literaturaĵojn — kaj esperas ke vi ne ĉesos!

La venonta numero estos la kongresa numero. Ni bezonas raportojn, rakontojn, impresojn ktp. unuavice de la ELNA-kongreso en Tihuano, sed ankaŭ eventuale de la Universala Kongreso en Jokohamo kaj la IJK en Hanojo. Bv. sendi viajn kongresrilatajn materialojn al la redakcio ĝis la 16-a de septembro por certigi ke ili aperos en la kongresa numero — sed eĉ se vi maltrafos la limdaton tamen sendu ilin kaj ili aperos en posta numero.

Agrablan legadon!

Joel kaj Ĵenja

Hello dear *samideanoj* (fellow Esperantists)!

We truly hope that you haven't entirely given up on ever seeing *Esperanto USA* again! We are very sorry for the delay of the newsletter this year. For a period of time our life became extremely busy — but now, fortunately, things are calming down. We will gradually catch up in the remainder of this year (which means that you may receive three double issues) and in 2008 the rhythm will be back to normal. Thank you so much for your patience up to this point!

Don't be shocked when you notice on the cover of the next issue of *Esperanto USA* that “Esperanto League for North America” is lacking. During the recent ELNA convention in Tijuana the results of the voting were announced: the membership of ELNA approved the proposal to change the “doing business as” name of ELNA to “Esperanto-USA” (please note the hyphen, in contrast to the name of the newsletter). The official legal name will nevertheless remain ELNA.

The response to the previous literary issues so exceeded our expectations that we still have literary material! Therefore, about half of this double issue will be made up of literary works. Our thanks to everyone who has sent literary materials — and we hope you keep them coming!

The next issue will be the convention issue. We need reports, narratives, impressions, etc. first and foremost from the ELNA convention in Tijuana, but also from the World Convention in Yokohama and the International Youth Convention in Hanoi. Please send your convention-related materials to us by the 16th of September to insure their publication in the convention issue — but even if you miss the deadline send them anyway and they will be published in a following issue.

Pleasant reading!

Joel and Zhenya



Kio novas en la Centra Oficejo?

The last few months have been hectic at the ELNA Central Office. I moved to Oakland (California) from Portland (Maine) in early February, and for the next two or three months I spent all my time learning the routine at the CO, finding a permanent place to live, buying a car, finding a doctor and a dentist and a barber, and generally learning my way around the Bay area.

Nun ĉio estas en sufiĉe bona ordo, kaj mi volas speciale danki tiujn, kiuj ege helpis min translokiĝi. Vilĉjo kaj Lusi Harmon tre agrable kaj bonvene gastigis min en sia domo, kaj Anjo Harlow ege helpis min trovi loĝlokon kaj aŭtomobilon. Don Harlow afable kaj paciencie instruis min pri la rutino en la CO kaj eĉ nun donas konsilojn kaj helpon laŭnecese.

Don retired as Director in May, but continues to come to the office on a consulting basis several hours a week. His expertise about Esperanto literature can't be taught in a few months, so he still does much of the book ordering from publishers throughout the world.

Eble en venontaj artikoloj mi skribos pri la diversaj taskoj farendaj en la CO, sed en ĉi tiu artikolo mi volas fokusiĝi al la informpetoj, kiujn ni ricevas. Averaĝe, la CO ricevas tri aŭ kvar informpetojn ĉiutage. Preskaŭ ĉiuj venas de la formularo sur la hejmpaĝo de www.esperanto-usa.org. La plejparto de la informpetantoj loĝas en Usono,

kvankam ni ricevas petojn de aliaj landoj (lastatempe de Rusio, Singapuro, Germanio).

The people requesting information do not have to provide any specific reason for their request, but many provide this information in the comments section. Some requestors are parents who plan to homeschool their children in Esperanto. Some are already very excited about learning Esperanto, and can hardly wait to get the information. Once in a while we get a request from someone in prison who has time on his hands and wants to learn something.

La kvanto de informpetoj estas sufiĉe granda, ke ni ne povas individue respondi al ĉiu petanto. Do, ni sendas antaŭpretigitajn pakajojn de informo pri Esperanto, pri ELNA, kaj pri stud-materialoj. Plue, ni sendas la nomon kaj adreson (inkuzive de retadreso) de ĉiu petanto al loka klubo aŭ loka grupo.

Unfortunately, about 30% of the requestors do not live near a local group or club. So, I would like to find individual Esperantists who are willing to welcome newcomers to the Esperanto movement



JENJA AMIS

in the U.S. The commitment is minimal, and the benefits to the U.S. Esperanto movement are significant. If you are interested, please see my announcement ("Welcomers Needed") in this issue of *Esperanto USA* or drop me a note at elna@esperanto-usa.org.

Bill Harris,
Director, Central Office

Welcomers Needed

The ELNA Central Office receives many requests for information everyday.

Some of these requestors do not live near a local club or group. So we need people who are already involved with Esperanto to welcome these newbies into the U.S. Esperanto movement.

If you volunteer to help out, the amount of effort required is minimal. When we get a request for information from someone who lives within 100 miles of you, we will e-mail the requestor's name and address to you. We

will NOT provide your name or address to anyone.

At a minimum, you can send an e-mail, welcoming the requestor to the U.S. Esperanto movement. You could also offer help in learning Esperanto or offer to get together or send an invitation to a meeting.

If you are interested in helping to welcome new Esperantists into the U.S. Esperanto community, please send me a note at elna@esperanto-usa.org.

Bill Harris
Director, Central Office

Gratulojn al la Novaj Estraranoj!

Gratulojn al novelektitaj estraranoj Ĵenja Amis, Christopher Zervic kaj Tim Westover kaj al reelektita estrarano Anjo Harlow! Ĵenja, Christopher kaj Anjo servos ĝis 2010 kaj Tim servos ĝis 2008 (por plenigi la mankon lasitan pro tio ke Julie Spickler fariĝis sekretario).

Gratulojn ankaŭ al Anna Bennet, kiu fariĝis Kasisto de ELNA, kaj Julie Spickler, kiu fariĝis Sekretario de ELNA.



La Balotado

Laŭ la rezultoj de la balotado, Julie Spickler fariĝis la sekretario. Kiel estraranoj elektigis Jenja Amis, Anjo Harlow kaj Christopher Zervic: ili servos ĝis 2010. Tim Westover servos kiel estrarano ĝis 2008, por plenumi la restantan oficperiodon de Julie Spickler.

La propono ŝanĝi la nomon de nia organizo sukcesis. La Centra Oficejo, la komitatoj kaj la estraro kiel eble plej frue komencos uzi la nomon **Esperanto-USA** kiel la novan nomon de ELNA. La leĝa nomo de ELNA restos kiel ELNA, kaj Esperanto-USA estos nia *DBA* nomo (angle "Doing Business As").

La Kasisto

Nia kasistino estas Anna Bennett. Ŝi anstataŭis Vilĉjon Harris, la antaŭan kasiston, kiu nun estas la Direktoro de la Centra Oficejo. Anna Bennett servos kiel kasisto ĝis 2009. Anna rimarkis ke la tasko pri-trakti la buĝeton kaj financajn aferojn estas iom pli facila, ĉar la Direktoro estas la antaŭa kasisto.

Proponoj kaj Diskuttemoj

La Estraro kunsidis dum du tagoj antaŭ ol la kongreso malfermiĝis. Ni diskutis kaj aprobis proponojn, kiujn la membraro aprobis poste dum la kongresaj aferkunsidoj, inkluzive de la jenaj proponoj kaj temoj.

Lusi Harmon estas honora membro de ELNA. La Estraro aprobis ankaŭ la proponon subteni Lusi Harmon kiel reprezentanton al la Komitato "A" de UEA por Usono.

Ni aprobis kelkajn dank-proponojn. Ni dankas la kandidatigan komitaton pro ilia bonega laboro, kiu ebligis al ni havi bonegan liston por nia lastatempa balotilo. Ni dankas la hotelojn en Tihuano kaj Santee, kie okazis

Raporto de la Prezidanto

Okaze de la sukcesoplena Landa Kongreso de ELNA/Esperanto-USA en Tihuano, Meksiko, la 27-30-an de julio, 2007

la kongreso kaj la estrara aferkunsido. La Estraro dankis al la Daŭra Kongresa Komitato (kiun estras Jim Henry) kaj la Loka Kongresa Komitato, aparte al Mar Cardenas, pro la bonega laboro, kiun ili faris por plani kaj okazigi tre sukcesplenan 55-an Landan Kongreson de ELNA/Esperanto-USA.

Esperanto USA (revuo)

La bulteno aperos ses fojojn en 2008 kaj estos nia ĉefa organo por informi la membraron, ĉar tion esprimas la statuto de ELNA. La bulteno enhavos oficialan informon kaj pli multajn raportojn de regionaj kaj lokaj agadoj.

La Centra Oficejo

Ni serĉas novan lokon por la Centra Oficejo. La nuna loko ne plu haveblas post la 30-a de junio, 2008. La kialo estas ke la konstruaĵo estos detruita por fari spacon por novaj loĝejoj. Nia prefero estos resti en Emeryville aŭ alia tre proksima urbo en la regiono de Oakland / San Francisko. La Centra Oficejo bezonas helpon de la loka grupo tie kie ĝi estos. Se via klubo povas sufiĉe bone subteni la Centran Oficejon, kaj se en via urbo haveblas spaco kiu estas taŭga kaj ne multekosta, bv. raportu al iu en la Estraro.

Venontaj Kongresoj

En 2008 ni kongresos kune kun TAKE (Tut-Amerika Kongreso de Esperanto) en Montrealo, Kanado, la 12-18-an de julio, 2008. Vidu informon en nia retpaĝaro www.esperanto-usa.org.

Ni serĉas lokon por la Landa Kongreso de 2009 kaj 2010. Tiuj kongresoj okazos en Usono. Se via loka grupo deziras gastigi la kongreson, bv. informi la estraron aŭ la komitaton (Jim Henry) kiel eble plej baldaŭ. Ni celas havi almenaŭ du kongresojn ĉiam en la planoj. Ni anoncos la landan kongreson 2009 kiam la estraro aprobos vian proponon, kaj ni anoncos la kongreson por 2010 dum la landa kongreso en Kanado en 2008.

Jarfinaj Raportoj

Ni ŝanĝos nian planon pri raportoj kaj nia buĝeto por kongrui kun la kalendaraj jaro. Antaŭe ni raportis pri financaj aferoj por nia fiska jaro kiu finiĝas la lastan

tagon de aprilo. Ni verkis la jarraportojn por la jaro inter la landaj kongresoj, ekzemple por la jaro inter julio kaj junio. La membriĝo estas por la kalendaraj jaro.

La problemo pri tia aranĝo estas, ke la diversaj raportoj kaj planoj estas por diversaj jaraj periodoj, kaj ni eĉ ne povis respondi al petoj por jarraportoj por la kalendaraj jaro. Tial, ni klopodos ŝanĝi la raportojn kaj periodon por la buĝeto por kongrui kun la kalendaraj jaro. Laŭ tiu plano, ni povos kunlabori pli forte kun aliaj organizaĵoj kaj havi normalajn periodojn por raportoj. Ĉio estos por la samaj monatoj, inkluzive de la jarraportoj, la buĝetoj, la financaj raportoj, la laborplano, la membriĝa periodo ktp. Por ne ĝeni niajn feriajn tagojn en decembro, ni faros kiel eble plej multe pri planoj kaj raportoj en novembro, kaj finos ilin en januaro.

Niaj jarraportoj kaj laborplano ne multe similas unu al la alia, kaj tute ne similas al la laborplano aŭ jarraporto de la estraro de UEA. Por labori pli efike, ni studos la laborplanon kaj raporton de UEA kaj niajn proprajn dokumentojn. Ni cerbumos. Ni elpensados niajn planojn. Niaj agadoj venu de niaj celoj kaj planoj, kaj tiel niaj raportoj pli kongrue spegulos nian laborplanon. La laborplano troviĝas en nia retpaĝaro. Ni invitas vin, kaj petegas, ke vi legu ĝin kaj donu komentojn al la Estraro. Ni bezonas viajn ideojn kaj helpon.

Duncan Charters

Mi dankas al Profesoro Duncan Charters pro la granda helpo kiun li donis al la kongreso kaj al Mar Cardenas. Lia ĉefa prelego, lia traduko por ekskursoj, lia amuza prezentado dum la distra vespero kaj aliaj agadoj helpis multe al la sukceso de la kongreso.

Harlow Premio

Ni anoncis la rezultojn de la Harlow Premio por 2007 (la informoj pri tiu ĉi literatura konkurso troviĝas en nia retpaĝaro). La informo pri la konkurso por 2008 aperos ĉi tie en nia papera bulteno.

La jaro 2007 estis la unua jaro por la Harlow Premio, kiu honoras konkursantojn omaĝe al Don Harlow, pro lia grandega kaj bonega prizorgo de literaturo kaj aliaj

agadoj por la Movado.

Ĉiu gajninto ricevos 50-dolaran premion. Jen la kvin gajnintoj por 2007 en laŭnoma ordo.

George Baker, per traduko de *To a Waterfowl* de William Cullen Bryant.

Aarne Fritzon, per traduko de *O Captain, My Captain* de Walt Whitman.

Kris Long, per traduko de *Success is Counted Sweetest* de Emily Dickinson.

Russ Williams, per traduko de *El Dorado* de Edgar Allan Poe.

Christopher Zervic, per traduko de *The Battle Hymn of the Republic* de Julia Ward Howe.

Internacia Kunlaboro

La temo de la kongreso estis Internacia Kunlaboro. Tio estis ne nur slogano, sed estis la laboro de la kongreso. Ni celis tion dum la

estrara kunsido, la aferkunsidoj de la membraro, kaj en la kunsido de la Amerika Komisiono kiun estris D-ro Stephen Brewer.

Dankon pro via servo al la Movado kaj al Esperanto-USA. Ek kaj antaŭen, samideanoj, kunlaborantoj.

Amike,

Filipo Dorcas, prezidanto, Esperanto-USA
filipo@grupoj.org



Esperanto / NASK en NPR

La 21-an de julio aperos raporto en la NPR-programo "Weekend America" pri NASK (Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto), kiu okazas nun en San Diego. Krissy Clark, raportistino de "Weekend America," venis al NASK pasintvendredon kaj pasigis du tagojn kun ni. Ŝi vizitis la klasojn, intervjuis studentojn kaj instruistojn, festis kun ni, kaj ekskursis kun ni al la San Diego Bestoĝardeno. Dum la du tagoj ŝi preskaŭ ĉion surbendigis kaj kaptis multon de la gaja etoso de NASK.

Morgaŭ la programo aperos kiel parto de la ĉiusemajna radioelsendaĵo, kiu estas aŭdigita tra la tuta lando, en pli ol 150 stacioj. La raporto ankaŭ estos legebla / ajnmomente aŭskutebla en la retejo de "Weekend America" ĉe http://weekendamerica.publicradio.org/programs/2007/07/21/a_weekend_of_esperan.html (la paĝo espereble ĝisdatiĝos / ampleksiĝos post la unua elsendado de la raporto morgaŭ posttagmeze).

Bonvolu aŭskulti "Weekend America" per la radio aŭ interreto!

On the 21st of July a report about Esperanto and NASK (happening right now in San Diego) will air as part of

"Weekend America," a two-hour weekly program heard on over 150 radio stations across the country. Krissy Clark, a reporter for Weekend America, came to NASK last week and spent two days with us. She visited the classes, interviewed students and teachers, and took a trip with us to the San Diego Zoo. During the two days, she taped almost everything and captured much of the joyful

spirit of NASK.

Tomorrow the program will be part of the weekly broadcast. The report can be read and heard at http://weekendamerica.publicradio.org/programs/2007/07/21/a_weekend_of_esperan.html (hopefully this page will be updated after the story airs tomorrow).

Listen to "Weekend America" tomorrow — on the radio or on the Internet!

Tim Westover

De/From www.esperanto-usa.org

Project for local groups to promote Esperanto

(I am writing this in English, because enthusiastic beginners may get some ideas from this project.)

The project is called "A Language Festival". Here is a summary:

1. Find a large room to hold the festival.
2. Invite some people to each make a 15-minute presentation about a language other than English. That is, one person will present French, another Russian, etc.
3. Invite the general public to attend and listen to these presentations about various languages.
4. Start the festival by introducing the Esperanto group as the sponsor, and

ask the audience to pick up Esperanto brochures from the side tables before they leave.

I have never organized such a festival, but I did participate in one last year in Parma, Italy. In that case there were about 20 presenters (and so 20 languages). Because of the large number of presenters, the presentations were done three or four at a time in the courtyard of the public library.

Benefits:

- The festival will attract people who are interested in languages. These are prime candidates for Esperanto.

- Newspapers, radio and other media are more likely to publish/broadcast information about a language festival than about Esperanto, because the festival appeals to cultural diversity.

- The audience is reminded of the many different languages in the world, and so the idea of a "language problem" is more readily accepted.

Other advantages:

- The organizers of the festival do not have to speak Esperanto well, so anyone in the Esperanto group can participate in organizing the project.

- Other groups interested in cultural diversity and cultural exchange can help organize the festival. These other groups can be a good source of presenters.

- The presenters do not have to be fluent in the language they are presenting. They just have to know enough to make a 15 minute presentation (mostly in English).

A word of warning: The organizing group must include a strong "policeman", who will stop each presentation after 15 minutes, so the next presenter can begin. A Q and A period can be scheduled after all presentations are done.

Bill Harris

From www.esperanto-usa.org

Granda decido: Mi vojaĝos al Usono Partoprenonte en NASK 2006!

Margaretha Symoens, Belgio

Tio estis la unua paŝo. Poste sekvis regulaj informoj kaj aranĝoj perrete, kie Lee (mi supozas) malfermis la Yahoo-grupon NASK2006. [Lee Miller, usonano, estis la kunordiganta instruisto.]

Ellen [Ellen Eddy, la administranto de la NASK-kursaroj] kaj Lee gvidis nin dum pli ol du monatoj per tre akurataj respondoj al demandoj de nekonataj personoj. Pli kaj pli kreskis sento de amikeco, kaj mia lasta timeto forfalas. Mi jam havis amikojn, ankoraŭ sen vizaĝoj. Tamen mi estis malpacienca renkonti ilin.

Dank' al Ellen, bone preparita renkontiĝo en la flughaveno okazis glate; tie ni renkontis la japanojn kaj du usonanojn, sed bedaŭrinde ni maltrafis la samideanon venintan el Kroatio. Intertempe li telefonis al Ellen, kaj per magibastoneto ŝi solvis lian problemon.

En la buseto ni ricevis ampleksan klarigon de la ŝoforo pri vilaĝoj kaj arbaroj kiujn ni trapasis, kaj feliĉe Haruo [Haruo Ros', usonano] tradukis la rakonton en Esperanton. Tiam ni admiris la grandecon kaj verdan ĉirkaŭaĵon.

Atinginte al SIT, la kampuson kie ni ĉeestos dum tri semajnoj, la surprizo estis mirinda. La ĉirkaŭaĵo estis grandega, verda, monteta, kaj mi aŭdis silenton. Grandaj konstruaĵoj estis disemataj en la vasta parko.

La bonvenigo estis varma, feliĉe, ĝustatempa por vespermanĝi, kaj ĉiuj ricevis tuj sian ĉambrosiloson kaj dokumentojn por uzi la komputilojn.

Lunde okazis konatiĝo kun niaj instruistoj, kaj samtempe interkonatiĝo kun la aliaj partoprenantoj. Preskaŭ ĉiam la

unua demando estis de kie ĉiuj venis. Entute ni estis 29: tri personoj estis el Kanado, kvar el Japanio, la feliĉe retrovita Kroatio, unu el Nepalo, kaj 17 usonanoj el diversaj ŝtatoj. Mi estas el Belgio, kaj mi vojaĝis kun samideano de nia klubo.

La geinstruistoj Katalin Kováts kaj Sylvain Lelarge loĝas en Nederlando. Lee kaj Ellen bonvenigis nin, kaj ankaŭ prezentis Haruon kiu respondicis pri "La NASKa Fasko", la taga ĵurnalo.

Ankaŭ Derek [Derek Roff, usonano el Nov-Meksiko] estis surloke, kaj li estis la filmisto. Rapide ni malkovris ke li havas grandajn teknikajn kaj lingvan kapablojn. Li multe helpis solvi komputilajn problemojn kaj estis nia PIV-konsilisto.

La kursoj estis dividitaj laŭ tri niveloj, tri horojn matene kaj same posttagmeze. Sed ĉiuj rajtis partopreni du kursojn; preskaŭ ĉiuj avide akceptis tiun eblon.

Matene instruis Sylvain en la dua nivelo, kun ĉiam bonaj, ĝojaj humoro kaj humuro. Lia instrumaniero vole-nevole stimulis nin aktive kaj paroleme kunlabori. Kanti helpis, kaj nia vortriĉeco altiĝis tagon post tago.

Posttagmeze unu grupo sekvis Lee, kiu instruis la unuan nivelon, pri pli da gramatiko. La tuta grupo ankaŭ havis ŝancon profiti de lia kompetenteco dum speciala horo gramatika.

Katalin instruis la trian nivelon, kaj ŝi malfermis novan mondon, uzante Vincenton Van Gogh, nederlandan pentriston, kiel temon por sia kurso. Tio estis unika eblo, ĉar ni ne nur lernis kiel precize uzi akuzativon, sed la enhavo de la tekstoj vekis en ni nekonatan flankon de pentro-arto de Vincento Van Gogh. Kun bel-



(de maldekstre) Doris Vallon-Wheeler, Margaretha Symoens, Ellen Eddy

ega, abunda materialo, ludmaterialo kaj hejmtaskoj, ŝi gvidis nin per nova pedagogia metodo al ĝusta vojo.

Niaj ĉambroj estis varmaj, sed klasĉambroj, biblioteko kaj la komputilejo havis klimatisilon. Estis agrable labori per modernaj komputiloj, kaj dank' al nia propra enirkodo, ĉiuj uzis ilin laŭ volo kaj bezono. Tio estis tre utila ankaŭ por hejmkontaktoj kaj hejmtaskoj por Katalin.

En la manĝejo aliaj gestudentoj informiĝis pri la aŭdita lingvo. Responde al ilia demando, Katalin kaj Sylvain instruis dufoje enkondukan kurson. Ankaŭ por ni, samideanoj, partopreni estis ĝoje kaj pedagogie interese!

Plusvaloro al la trisemajna studado, ni interkonatiĝis rapide, kaj post kelkaj tagoj sen krokodili ni sentis veran amikecon. Mirinde estis ke la grupo konsistis el gejunuloj, mezjunuloj kaj malplimezjunuloj, ĉiuj kunlaboris, kaj horoj mankis por sufiĉe interparoli. Sen hezito ĉiuj helpis trovi la netrovitan vorton de la kunparolanto, kaj foje oni longigis frazojn kaj pensojn, sed ĉiam kun rezulto. Ĉiuj estis stimolataj de la sama motivo: plibonigi sian konon de Esperanto, kaj uzi ĝin. Sed ekzistis pli ol la lingvokomunikado. Ni sentis samajn pensmanierojn, kaj interŝanĝis

ideojn; agrable estis ke junuloj kaj maljunuloj trovis la eblecon por interŝanĝi siajn opiniojn pri la plej diversaj temoj. Ankaŭ ni ridegis multfoje, kiam ŝercoj aperis.

Ni vivis dum tri semajnoj en granda familio, kvankam ni ne konis unu la aliajn antaŭe. Kelkaj partoprenantoj venis per aŭto, kaj ĉiuj pretis veturigi laŭ bezono ien ajn. Tiel ni partoprenis la kvaran de julio en la granda festparado; tio estis bela ebleco por senti sin tuj en Usono.

Dum semajnfino ni malkovris grandegan arbaron kun belega rivero. Ĝi estis tiel alloga dum varmega vetero, ke ni ĝojis naĝadi kaj eĉ kajakveturi. Dankon, veturigistoj!

Vespere pluraj partoprenantoj prezentis kuriozaĵojn el diversaj landoj. Tiel japanoj nin regalis per vera te-ceremonio, origami-kurso, prezento pri la UK en Jokohamo en 2007, kaj lerte ni nodis huroŝikojn kiel dorsosakojn. El Nepalo ni vidis belan fotosesion kun prelego, kaj ni ankaŭ konatiĝis kun vitroblovigado el Usono. Simmon muzikis per nekonata instrumento, la *Chapman Stick*, kaj belege kantis memtraduktajn kantojn. Ĉiuj ĝuis la diversajn programerojn, kaj distriĝis agrable.

Por konkludi: la granda decido valoris! Dankon, amikoj!

Kiel organizi kongreson

Parto VII.

Tiu ĉi estas la sepa kaj lasta parto de serio da artikoloj pri organizado de Esperanto-kongresoj, specife de landaj kongresoj de ELNA, sed ankaŭ de regionaj kongresoj. Ĝi baziĝas sur la kongresa manlibro de ELNA (la originalan gvidilon verkis Frank Helmuth, Cathy Schulze kaj Bill Harmon; Ellen Eddy reviziis ĝin. Jim Henry plu reviziis kaj multon aldonis), kiu troviĝas ĉe www.pobox.com/~jimhenry/esp/esma/planoj.htm.

Kongresdokumentoj

Taŭga koverto, sako aŭ alia havebla ujo estu uzata por enteni la diversajn kongresdokumentojn kaj aliajn informojn. Turistaj informiloj, urbaj kaj regionaj mapoj, reklamaĵoj kiel plumoj, pingloj, notlibretoj, kaj aliaj aĵoj senpagaj povas esti disdonataj kune kun la kongresdokumentoj. Ĉi tiaj lokaj materialoj kaj aliaj agadoj parte de la LKK povas doni al la Kongreso agrablan kaj allogan etoson por la partoprenantoj.

Nomŝildoj

Estas almenaŭ tri eblaj specoj de nomŝildo: kun krampo, pinglo, aŭ kolpendaĵo. Malpreferu la pinglojn, ĉar ili damaĝetas true la ĉemizon. El la diversaj specoj de kol-pendaĵo, kelkaj pli sekure ligas la nomŝildon al la ŝnureto ol aliaj. Verŝajne la plej bonaj, sed eble ankaŭ plej multekostaj, estus tiuj kun krampo.

- Nomo grandlitere [grando de literoj: 36], familia nomo etmajuskle (small caps).
- Urbo, ŝtato/provinco, lando.
- Identigo de ELNA, la kongresa informo (loko, seri-nombro). La nomo "Esperanto League for North America" aperu, ne la siglo "ELNA", kaj la vorto "Esperanto" estu sufiĉe granda.
- Apartaj nomŝildoj (eble malsama koloro, aŭ kun kroma signo kiel cirklo aŭ steleto; eble kun kolora rubando alfiksitaj) por komencantoj, ĵurnalistoj, familianoj ne-esperantistaj, vizitantoj.

Plurajn tagojn antaŭ la kongreso, presigu nomŝildojn por la homoj kiuj antaŭregistriĝis. Faru ankaŭ kelkajn blankajn nomŝildojn (kun la kongresa informo sed sen nomo) por la malfrue registriĝontoj.



Thomas Eccardt: la ĉeforganizanto de la ELNA-kongreso en Novjorko en 2006

Tuj antaŭ la kongreso

Almenaŭ unu semajnon antaŭ la kongreso, donu al via hotela kontaktulo plenan liston de ekipaĵoj bezonataj de diversaj prezentantoj, kun horaro (en la angla, kompreneble!) pri kie kaj kiam vi bezonos ekz. DVD-ludilon, projekciilon, ktp. (Tian liston vi mem uzu ankaŭ dum la kongreso.) Morigu tiun ankaŭ pri samtempigo de horloĝoj, agordigo de piano, ktp. Se la LKKanoj mem provizos certajn ekipaĵojn, provu ilin hejme kaj ĉe la kongresejo kiel eble plej frue.

Je la limtempo por la bankedo, donu al la hotelistoj finan nombron de manĝontoj, kun indiko pri kiom el ili estas vegetaranoj/vegetalanoj, kaj kiuj alergioj menciigis en la aliĝiloj.

La tagon antaŭ la estrarkunsido, la ricevinto de libroj por la libroservo devas porti ilin al la kongresejo kaj transdoni ilin al la Direktoro de la CO; se eblas jam uzi la libroservo-ĉambron, ili povas jam ekmalpaki la librojn. Tiu tago estas bona por dismeti kelkajn direktajn afiŝojn por helpo al la estraro kaj aliaj fruaj alvenantoj, kaj starigi anonc-tabulon.

La tagon de la estrarkunsido, iuj en la LKK kontrolu ĉu la horloĝoj fakte estas samtempigitaj laŭpete, kaj se ne, repetas ke la hotelistoj faru tuj se ili ne povas mem fari. Ili ankaŭ antaŭprovu, se eblas, la teĥnikajn ekipaĵojn (DVD- kaj vidbendmontriloj, televidilo, ktp; aparte komputila ligo al televido), por ke tiuj jam bone

funkciu por la prezentantoj.

En la posttagmezo de tiu tago iuj starigu la registran tablon je la anoncita tempo. Aliaj eventuale pretigu la restantajn aferojn por la interkona vespero. La registra tablo havu ne nur la liston de aliĝintoj, kaj la kongresajn sakojn kun kongresa programlibreto, nomŝildo, kaj aliaj aferoj, sed ankaŭ diversajn informilojn pri Esperanto por disdoni al ne-esperantistoj kiuj preterpasas kaj scivolemas. Se sufiĉas da volontuloj, iu ĉestu la registran tablon dum la tuta kongreso, almenaŭ ekster la horoj de la grandaj programeroj (solenaj, bankedo ktp).

Dum la kongreso mem

Dum la kongreso, la membroj de la LKK havos diversajn devojn, rilate al interrilato kun la stabanoj de la kongresejo, anoncoj (aparte pri ŝanĝoj en la programo), helpo al la prezentantoj, la stabanoj de la CO, la estraro, kaj la kongresanoj ĝenerale. Starigu en plej videbla loko afiŝtabulon, aŭ uzu jam ekzistantan laŭ permeso de la kongresejo, kie vi kaj aliaj povas meti anoncojn. La prezidanto de ELNA kutime estas la ĉefa parolanto dum la solenaj malfermo kaj fermo, sed la ĉefo de la LKK ankaŭ kutime parolas tiam; interalie kun dankado al diversaj homoj kiuj helpis pri la kongreso. Faru la voĉajn anoncojn kun mikrofono kiam eblas, sed ĉiel ajn sufiĉe laŭte. (Eble la ĉefo de la LKK volos delegi iun alian LKKanon kun pli laŭta voĉo por fari tiujn anoncojn.)



Steve Brewer prelegas pri lokaj grupoj en Usono

Kunvenu frue (eble post la interkona vespero, aŭ post la solena malfermo) kun la homoj kiuj volontulis helpi dum la kongreso. Donu al ili specifajn taskojn ekz. rilate al la registra/informa tablo, akuratigo (vidu sube), tehnik/a/ekipaĵa helpo al prezentantoj, kunuleco al komencantoj aŭ alilandaj vizitantoj, ktp. Faru volontulan horaron kun deĵorhoroj, kaj lasu al la homoj skribi siajn nomojn en elektitaj spacoj.

Ĉe la publika sesio kaj eventualaj senpagaj komercantaj klasoj, iu kolektu la nomojn kaj kontaktinformojn de tiuj, kiuj interesiĝas pri Esperanto kaj volas daŭran kontakton kun la loka klubo.

Dum la solena malfermo, la ĉefo de la LKK anoncu “oficialan kongresan tempon” (antaŭe samtempiginte sian brakhorloĝon kun videbla horloĝo en la kongresjo) kaj petu al la kongresanoj samtempigi siajn brakhorloĝojn. Estas kutime dum ĉi tiu soleno, ke reprezentantoj de diversaj lokaj grupoj, alilandaj E-o asocioj, ktp. salutu la kongreson. Ankaŭ esperantistojn forpasintajn en la jaro post la antaŭa kongreso oni honoru per silenta paŭzo.

Se haveblas sufiĉe da volontuloj (ĉu en la LKK aŭ ekster ĝi), ekzistas alia bona maniero akuratiĝi la horaron. Kvin minutoj antaŭ la teoria fino de ĉiu programero, iu volontulo mallauĉte eniru la ĉambron kaj montru al la prezentanto aŭ gvidanto afiŝon “KVIN MINUTOJ RESTAS”. Je la fino,

tiu montru alian afiŝon “HALTU”. Preferinde estas havi 3-5 akuratigistoj, por ke neniu el ili devus deĵori tro longe, kaj ili mem povos ĝui la programon.

Dum la solena fermo, estas konvene aparte honori la honoran gaston kaj alilandajn vizitantojn.

Post-kongresaj devoj

Se estis moralaj subtenantoj de la kongreso (aŭ aliaj kiuj pagis sed ne venis nek nuligis sian aliĝon), iu en la LKK poŝtu al ili ekzemplerojn de ĉiuj kongresaj dokumentoj, laŭeble inkluzivante fotojn kaj la paperojn, kiujn disdonis diversaj prelegantoj.

Iu (ne nepre en la LKK) verku kongresraporto(j)n por Esperanto USA kaj por AktivUsono. Tio inkluzivu la nombron de partoprenantoj, dirojn pri la gastoj kaj la plej interesaj prezentaĵoj, kaj (se oni jam scias) informeton pri la venontjara kongreso. Indas ankaŭ inkluzivi fotojn.

Kontaktu la novajn interesitojn, kiuj el la loka regiono venis al la kongreso aŭ al la komercantaj klasoj.

Se vi trovis mankojn en la kongresa manlibro, skribu al la komisiito pri kongresoj kun sugestoj por plibonigo de tiu dokumento.

Diversaj sugestoj

La lokanoj havu identigajn T-ĉemizojn; ĉiu portu tion je la unua tago de la kongreso, por ke la alvenantoj sciu kiun de mandu pri aferoj.

Ĉiu el la LKK kolektu dum la prepara tempo liston de helpantoj, kaj iu unuigu la listojn, por forgesi neniu en la dankoparolo dum la Solena Fermo.

Havu mapojn de Usono kaj de la tuta mondo por uzo dum la interkona vespero — ĉiu runde identigu sian devenlokon. Aŭ meti la mapojn sur tabulo, kaj homoj povas enmeti pinglon por indiki sian devenlokon.

Lokaj poŝtkartoj sendotaj al la subtenantoj membroj de la kongreso (kaj eventuale al kongresantoj kiuj malsanas aŭ simile), subskribataj de diversaj kongresanoj dum

la interkona vespero ktp. kaj poŝtata dum la kongreso aŭ tuj poste.

Ĉiumatena kunveno/anonperiodo, ekz. tuj post matenmanĝo. Ne longa kunveno, eble 10 minutoj, por laŭtvoĉe informi la kongresanojn pri gravaj aferoj.

Sonbendigo de prelegoj, por la sonbenda katalogo de ELNA... Oni eble devas kontrakti pri tio kun la hotelo, aŭ eble iu povas alporti propran sonbend-registrilon (kaj mikrofonon, ekstrajn pilojn kaj multajn kasedojn).

Doroteo Holland sugestas, ke dum la bankedo la estraro kaj oficistoj sidu kune ĉe la ĉeftablo por ke ĉiu vidu kaj konatiĝu kun ili. Sed estas alia ideo pri sidaranĝo, nome, ke estu aŭkcio de kunprezidantaj sidlokoj laŭ plej altaj donacoj al ELNA. Tion oni faris en pluraj jaroj. En Bostono (2003) estis du aŭkcioj, unu por sidlokoj kun la Prezidanto kaj Vicprezidanto de ELNA, kaj alia por sidlokoj kun la honorgastoj, Esperanto-muzikistoj Kimo kaj jOmO.

Petu informon de turismaj kaj kongresaj servoj — la *Visitor's Bureau, Chamber of Commerce* ktp... Ekz. kontrolu pri senpage haveblaj mapoj, turismaj broŝuroj, suveniretoj.

Finaj Rimarkoj kaj Konsiloj al Lokaj Komitatoj

Sukcesaj ELNA-kongresoj jam okazis en lokoj kie relative malgranda kvanto da Esperantistoj troviĝis. Se ordeme kaj bone planita aliro estas uzata, relative malgranda grupo povas facile plenumi ĉiujn necesajn taskojn.

Kongresoj bonaj en multaj rilatoj (sed kun malmulte da partoprenantoj) foje okazis, kiam la komitato komencis malfrue aŭ ne sukcesis fini la aranĝojn pri kongresejo ĝis malfrue (ekz. 6 monatoj antaŭ la kongreso, en 2000 kaj 2001). Sed por ebligi al plej multaj homoj alveni, por aranĝi plej bonan programon, kaj por malpliigi la streĉan laboron por la komitatoj mem, preferindas komenci tre frue. Kiom frue? La LKK por Austin en 2005 komencis sian laboron ĉirkaŭ jaron kaj duonon antaŭ la kongreso (frue en 2004). Russ Williams, estro de tiu LKK, rekomendas komenci tre frue — mi supozas, ke du jaroj antaŭe ne estus tro frue.

Kiam la loka grupo komencas diskutadon pri eblecoj inviti ELNA-kongreson al sia urbo, plankomitato estu starigita kon-

sistante el kelkaj el la plej aktivaj membroj kiuj havas la tempon por kunigi la necesajn informojn. Unu persono estu estro de la LKK kiu eventuale nomu la diversajn funkciulojn por la taskoj rilate al organizado de la Kongreso. Resume, la roloj inkluzivas:

- Hotel-kontaktulo
- Buĝetulo
- Publikigisto
- Samĉambran-listestro
- Aranĝanto de kunuloj por komencantoj kaj vizitantoj
- Analizanto de aliĝiloj
- Redaktoro de hejmpaĝo kaj listgrup-administranto
- Organizanto(j) de eksurso(j)
- Skribanto de invit-leteroj por alilandanoj kiuj bezonas vizon
- Horaristo

- Verkanto(j) kaj redaktoro de la programlibro

- Libroservo-ricivanto
- Verkanto de post-kongresa raporto

Memoru ke la ELNA-Kongreso estas la plej grava kunveno de esperantistoj en Usono kaj ĝia sukceso dependas plejparte je la kapableco kaj laboro de la LKK. La Komisiito de Kongresoj kaj la Centra Oficejo de ELNA estas pretaj helpi ĉi-maniere sukcesigi la Kongreson kaj ĉiam pretas konsili kaj helpi la LKK-n kie eblas.

Finfine, pluraj lokaj grupoj kaj kluboj spertis ke kunlaborado por okazigi sukcesan kongreson rezultigas en pli forta kaj bona loka grupo, kaj ke pere de la reklamado la membreco plimultiĝas kaj intereso pri Esperanto kreskas.



Dum interkona vespero (ELNA-kongreso 2007)

Anonce

Korespondi Deziras

Saluton! Mi estas brazila esperantisto, kaj mi ŝatus korespondi kun homoj el multaj landoj por plibonigi mian parolkapablon en Esperanto. Mi instruas pri sorobano kaj estas en Pasporta Servo. Bv. skribi al Francisco Batista De Oliveira espatista@yahoo.com.br.

Koran saluton al vi esperantistoj el Usono! Mi estas Gaspardo Ntakirutimana, mi loĝas en regiono Cyanguu en Ruando. Mi estas 34-jaraĝa kaj interesiĝas pri literaturo, lingvoj, muziko kaj la naturo. Mi parolas la francan, anglan kaj Esperanton. Mi volas korespondi pri diversaj temoj kaj tre volas havi geamikojn en Usono. Skribu al: Gaspardo Ntakirutimana. B.P. 429 Cyanguu, Ruando (Rwanda). Retadreso: gantak2001@yahoo.fr.

Available – Valuable Esperanto Collection. Books, Pamphlets, Brochures. Rare Materials at Reasonable Prices. Request Information from: Dr. Charles E. Simon, 10 Hanover Lane, Beachwood OH 44122.

La plej granda E-vortaro: nun Havebla

La fama lingvosciencia eldonejo BUSKE-Verlag en Hamburgo (Germanio) aperigis en aprilo 2007 *Grandan Vortaron Germanan-Esperantan*. La vortaro ampleksas pli ol 160 000 serĉvortojn kaj

parolturnojn sur 1679 paĝoj grandformataj. Ĝi do estas la [ĝis nun] plej ampleksa Esperanto-vortaro en la mondo. Por pliaj informoj kontaktu rete www.buske.de aŭ info@buske.de (germanlingve).

NOREK – en Kanado!

La Nord-Okcidenta Regiona Esperanto-Konferenco por Ameriko (NOREK) okazos inter la 21-a kaj 23-a de septembro 2007 en la vilaĝo Sidney apud la urbo Viktorio, la ĉefurbo de la kanada provinco Brita Kolumbio. Informojn kaj aliĝilojn petu de esperanto@shaw.ca aŭ skribu al: Wally du Temple, 765 Braemar Avenue, NorthSaanich, B.C., Canada, V8L 5G5.

Esperanto-Festivalo “Aroma Jalto”

Ukrainiaj esperantistoj invitas vin viziti la plej belan lokon de Ukrainio. Ĉi tie vi ripozos anime kaj fizike. En E-etoso, inter belegaj pejzaĝoj vi pensos pri paradizo. Tio estas “Aroma Jalto”- tradicia E-festivalo. **Tempo:** 1-a de majo – 11-a de majo 2008. **Loko:** Ukrainio, Krimeo, fama kuracloko Jalto. **Programo:** Seminario por E-instruantoj; diversgradaj lingvaj kursoj; ekskursoj, piedmarŝoj; koncertoj; klubo de gajaj kaj spritaj ktp. Kontribuantoj al la programo havos rabaton laŭ interkonsento. **Aliĝkotizoj:** 20 EUR (ĝis la 1-a de marto 2008) kaj 30 EUR (surloke). **Loĝado:** (2-lita ĉambro) – 10 EUR tage por persono;

manĝado: (3-foje tage) – 10 EUR. **Lingva ordo.** Tradicie severa. Nulaj komencantoj ne estas akceptataj. Dum la registrado ĉiu partoprenanto memstare plenigas la aliĝilon kaj respondas simplajn demandojn. Bv. kontakti la ĉeforganizanton (Volodimir Hordijenko) pri ĉiuj demandoj. p.k..35, Kijiv-133, UA-01133 ; tel./fakso (044) 285 17 01; rete: volodimir_h@yahoo.com; retpaĝo: www.ulej.org.ua/aj.

Oceania Kongreso en Nov-Zelando

La pastro-ermito ankoraŭ ne venis. Nur legpupitro staris meze de la ĉambro, kovrita per flava veluro. Sur la pupitro kuŝis kune – tiel proksime unu al alia – amaseto da mono, poste malgranda evangelio orumita kaj kruco kun krucumita Savanto. Dekstre de la legpupitro staris seĝo, poste – tablo sternita per tuko. Sur la tablo estis telereto da akvo, kuŝis paperfolioj laŭlonge kaj transe. Unu foliaro surtable kuŝis sur seĝo starigita tien. Sur muro malantaŭ ĉio tio pendis granda ikono de la krucumita Savanto. Dekstre de la krucumito pendis ikono de nekruumita Savanto. Poste – dipatrino kun bebo kaj fermitaj okuloj. Denove – dipatrino kun sabroj sur la brusto, ikonostazo kun ikonetoj. Antaŭ la ikonostazo brulis lampeto. Plue, sur alia muro, pendis krucumita monaĥo. Sur manplatoj de la monaĥo brulis lumigiloj, super la kapo flugis dispirito kaj sur la frunto estis skribite “Mi suferas pro la homaro”. Maldekstre de la krucumita Savanto pendis denove Savanto kun ŝafino surŝultre, denove dipatrino kun bebo, plue sanktuloj: Serafim el Sarov’, Flor-asketo, Eŭtiĥ-centestro, Klaŭdio-migrulo, “La Lasta Juĝo”. Oleo tre odoris.

Post iom da tempo eniris la pastro-ermito – malgranda griza maljunulo. Sur la ronda ventro de la pastro-ermito pendis blua tuko velura. Sur liaj ŝultroj kaj iom kliniĝinta dorso – nigraj strioj kun blankaj krucoj kaj diversaj vortoj. Sur la kapo brilis kalvaĵo.



La homoj klinis sin antaŭ li.

La pastro-ermito rigardis ilin iel lace, rigardis la krucumitan monaĥon, ekĝemis, poste krucsignis sin, ekkriis “Ripetu post mi!” kaj komencis:

– “Mi konfesas al Di-sinjoro...”

– Ne amasiĝu, porkuloj! – aŭdeblas de vestiblo voĉo de iu monaĥo.

– “Kaj al Virgulino-Dipatrino... kaj ĉiuj sanktuloj.”

– Nu, porkuloj!.. Fi! – aŭdiĝas.

– “Kaj al vi, Patro...” – legas la ermito.

Traleĝinte, li sidis sur la seĝo inter la legpupitro kaj la tablo kaj:

– Do, nun, – li diris, – aliru al mi unuope.

Homoj aliras, kliniĝas antaŭ li, flustras al li siajn pekojn.

La ermito krucsignas ilin:

– Mi pardonas kaj senkulpigas, – li diras.

Ili rampas por kisi lian manon. La pastro-ermito al iu donas, al alia – ne. Li tiregas la manon, kunsulkigas la bukklajn brovojn.

– Ne necesas! – ekkriis.

– Vidu, – flustris homoj, – li scias, kiu indas kion!

Poste la pastro-ermito trempas fingrojn en telereto, ne rigardante eltiras paperfolio el amaso: el jen unu foliaro, jen alia, jen el subtablo.

– Vidu, – denove flustras homoj, – li scias, kiu kian “benon” meritas!

Poste la pastro-ermito montras – dekomence perkape, poste permane – monamaseton.

Jen la nudpieda maljunulino proksimiĝis – tiu, kiu ploris en la vestiblo. Ŝi genuiĝis antaŭ li, multfoje klinis kapon al planko, kaj tiel sincere, tiel respektoplene.

La pastro-ermito tuŝis ŝian kapon per la antaŭtuko.

– Pli rapide, – li diris, – pli rapide!

La maljunulino ekstaris, ŝi volis ion diri al li, sed ne elbuŝigis, nur movis lipojn.

La pastro-ermito ekrigardis lupe.

– Nu, kion? – li demandis.

– Ho, paĉjo!

– Nu!

– Filo... dudekjara!.. Mi volis lin edzigi... Li kuŝas, ne staras.

La pastro oscedis.

– Oni bategis lin en policejo, – ploris la maljunulino.

– Do, li meritis, – la pastro vortĵetis al ŝi.

– Ho, Dio!.. Ĉu?.. Li nur diris al policano: “Forestas, – li diras, – la justeco en la mondo: iu laboregas, sed malsatas, alia fingron ne movas, sed vivas prospere”.

La pufaj vangoj de la pastro-ermito tuj ruĝiĝis. Liaj okuloj ofte ekpalpebrumis kaj:

– Silentu! – li ekkriis.

– Dio mia!.. Li ja, filo mia, tio okazis je Savanto-festo**...” Jen Savanto, – la filo diras, – Li instruas...”

– Silentu! – la ermito interrompis la maljunulinon.

Li rigardis ŝin rabobeste kaj:

– Eksterleĝuloj... Ili turnas sin al Savanto! Ili havas aferon al la Savanto...

Bestuloj!

– Dio mia, – ŝi diris al li, – mi ja scias nenion.

– Scii vi ne bezonas. Jen sidas tiuj, kiuj scias, – la ermito direktas ŝin al “La Lasta Juĝo, – per lango – kaj en fajron! – li ekkriis.

– Dio savu min de tio, – krucsignis sin la maljunulino. – Sed interalie... pastro!.. Li restis mia sola infano. Kaj la plej juna, kaj tiom saĝa, filo mia, alfabetulo... Dio mia! Estis sepopo de pli maljunaj, sed ĉiuj transmondiĝis... kun paĉjo... Malbono enterigis ilin: haveblis nek manĝaĵoj, nek vestaĵoj...

– Ne parolaĉu! – denove ekkriis la pastro-ermito. – Necesas preĝi al Dio, mendi diservon!

La pastro-ermito turnis sin al foliaro. La maljunulino metis tri kopekojn sur lian monamaseton.

Ŝi prenis paperfolion de li, rulas ĝin.

La ermito montras al ŝi la monamaseton.

– Dankon, paĉjo, – la maljunulino diris al li, – mi havas iom da... homoj pruntedonnis.

– Ne, – la ermito diras al ŝi, – ĉu vi metis tien ĉi?

– Mi metis, pastro.

Malrapide la maljunulino foriris korten, apogis sin al tilio kaj:

– Filo mia, filo... – ŝi ekploris.

Aliris al ŝi la vagulo kun karoa aso, etendis la manon al la folio.

– Nu, kio estas ene? – li demandis kaj malrulis la folion.

– “Animsava parolo al ortodoksaj kristanoj, – li eklegis, – Ho, gento homa! – li plulegis. – Kiel granda, kiel terura peko estas ekdeziri havaĵon de proksimumo! Ĝi estas peko nepardonebla en ĉi vivo, nek transmonde. Ĝi estas grincado denta, geheno fajra!”

– Dio mia! – ploras la maljunulino, – estu al li, filo mia, io por manĝi. Estu ne nur tiu pano seka...

– “Kion Dio donis al vi, tion kontente akceptu. Tio estas Lia volo sankta. Li, sanktulo, scias, al kiu kion...” – plulegis la karoa aso.

– Ho, savu min! Ho, kion fari? Ho, filo mia! – la maljunulino preskaŭ rompas fingrojn.

– Nu, kial vi ploraĉas? – demandas monaĥo el vestiblo. – Iru preĝi. Jen oni enlistiĝas por diserva mendo!

Ekvagus la maljunulino.


Ĝemis granda sonorilo...

18...

** La 6-a de aŭgusto (la 19-a laŭ la ortodoksa kalendaro) estas festotago de Aliformiĝado de Sinjoro; alivorte – festotago de Savanto.

Elukrainigis Viktor Pajuk

Unu Sinjoro



Vaikom Muhammad Basheer

Vaikom Muhammad Basheer (1908-1994) estis unu el la plej amataj malajalamaj aŭtoroj. Li partoprenis en la senbatala barakto por libereco de Hindio dum la 1940-aj jaroj. Li verkis multajn romanojn kaj rakontojn, kelkaj el kiuj estis tradukitaj en la anglan. Oni parolas la malajalamon en la ŝtato Keralo, en suda Hindio.

Vi ne havas klaran aferplanon. Vi vagadas tra malproksimaj landoj. Mono, neniom. Lingvo, nekonata. Vi povas paroli kaj la anglan kaj la hindustanan, sed tre malgranda estas la nombro de personoj tie, kiuj komprenas unu el la du.

Do, vi falas en multajn akcidentojn, spertas multe da deliktoj.

Tiel vi estiĝis en krizo. El tiu vin savis nekonata sinjoro. Kvankam multe da tempo jam forpasis, je iuj specialaj okazoj vi memoras... kial li faris tiel?

Nun imagu, ke tiu rememoranta vi estas mi, ke tio, kion mi priparolis, estas mia sperto. Pri la min-inkluziva homa raso mi havas certan malprecizan scion. Ĉirkaŭ mi estas bonuloj, krueleguloj, ŝtelistoj, estas kontaĝaj malsanuloj kaj frenezuloj – kutime oni ĉiam devas vivi kun atento. Malbono plias ĉimonde. Sed ni forgesas tion. Nur kiam tragedio frapas, ekmalformas ni.

Mi rakontos tiun tre malnovan kuri-ozan bagatelon:

De ĉi tie ĉirkaŭ mil kvincent aŭ du mil mejloj for estas granda urbo en la valo de la montaj vicoj. De antaŭ longa tempo la tieuloj ne faris al si la nomon pro afa-



bleco. Krueluloj estas. Murdo, amasa rabado, poŝostelado – ili ordinaraj okazoj estas. Tradicie la tieulo estas soldato. La aliaj estas pruntedonistoj el urbŝtatoj malproksimaj aŭ gardistoj ĉe muelejoj, grandaj oficejoj, bankoj ktp.

Mono tie estas granda afero. Por tio oni faru ion ajn, mortigu iun ajn.

Mi loĝis tie en tre malpura kaj malgranda ĉambro en strato malpurega. Mi havis laboron: nokte de la naŭa kaj duono ĝis la dek unua horo mi instruis la anglan al eksterlandaj laboristoj. Simple adreson skribi. Por tiu loko lerni skribi adreson estas granda edukado.

Oni vidas tiujn adresoskribistojn ĉe la poŝtoŝtupoj. Ili gajnas po de kvaronrupio ĝis duonrupio por unu adreso.

Tiu adres edukado estas por savi sin de ĉio ĉi aŭ, se la bezono aperus, por facile gajni iometon.

Ĉitempe mi kutime vekigis posttagmeze je la kvara. Tio estas por gajni ion alian – la morgaŭan teon kaj la tagmezan manĝon.

Do, laŭ kutimo, mi vekigis je la kvara. Mi kompletigis ĉiujn miajn tagdevojn kaj eliris ekstere por manĝi iom. Nu vi devas imagi, ke mi vestis min en plenan kompletan kiam mi eliris. En la poŝo de mia jako jen mia monujo. En ĝi dek kvar rupioj estis. Tio estis la tuta sumo de mia posedo, de mia vivo.

Kubutuminte tra la homamaso, mi aliris restoracion. Dirante sole “manĝon,” mi satigis la stomakon per ĉapatio kaj viando. Ankaŭ teon trinkis. Sume la kalkulo alvenis por ĉirkaŭ tri kvaronoj de rupio. Vi memoru tion.

Por pagi tiom, mi metis la manon en la poŝo de mia jako... mi tute ekŝvitis. Ĉio, kio veturis tra stomaklando, ekbrulis.

Kio okazis? La monujo mala-peris de mia poŝo!

Mi diris maltrankvile, “Iu poŝostelis mian monujon!”

Estis trohomoplena restoracio. Por eksurprizi ĉiujn, la restoraciisto ekridegis laŭte.

Li tiam skuis min per la roversoj de mia jako kaj diris, “Do vi ne intencas kvitigi tion, ĉu? Pagu la monon kaj forfikiĝu. Se ne, mi plukos viajn okulojn el via kapaĉo.”

Mi ĉirkaŭrigardis la aŭdantaron. Eĉ unu afablan vizaĝon mi ne vidis. La rigardo de malsataj lupoj!

Se li diras ke li plukos miajn okulojn, li ja faros tiel.

Mi diris, “Mi forlasu mian jakon ĉi tie. Monon akirinte, mi revenos por kvitigi.”

La restoraciisto ridegis denove.

Li diris al mi demeti la jakon.

Mi demetis la jakon.

Ankaŭ ĉemizon demeti li diris.

Mi demetis la ĉemizon.

Li ordonis min demeti la ŝuojn.

Ŝuojn mi demetis.

Fine pantalonon demeti li ordonis.

Li decidis tiel malvestigi min ĝis tute nuda, pluki miajn okulojn, kaj forigi min eksteren.

Mi diris, “Sube nenio...”

Ĉiuj ekridis.

La restoraciisto respondis, “Nu, mi dubas. Sube estos *io!*”

La kvindek personoj kun kruela ridado kune kriis, “Sube estos *io!*”

Mi ne povas regi la manojn. Mi vidas image. Du okuloj mankantaj, nuda homo staras sur la strato inter la amaso homa. Tiel finfiniĝas la vivo. Finiĝu... mi de ĉi tiu okazaĵo...estu! Kreinto de la mondoj! Dio mia! Estas nenion por diri. Ĉio bonaŭgura... ĉio favora!

Mi komencis malbutonumi la pantalonon unuope. Tiam profunda voĉo aŭdiĝis.

“Haltu! Mi pagos la monon.”

Ĉiuj rigardis tiudirekten.

Li estis blanka sesfutulo kun ruĝa turbano, nigra jaketo kaj blanka mantelo. Stirila liphararo kaj malhelaj okuloj.

Tiaj malhelaj okuloj estas oftaj tie. Li paŝis antaŭen kaj demandis la restoraciiston, “Kiom estas, vi diris?”

“Tri kvaronoj de rupio.”

Tiom li donis. Tiam li diris al mi, “Surmetu ĉion.”

Mi surmetis.

“Bonvolu veni,” li min invitis. Mi kuniris. Kiel mi povus esprimi al li mian dankegon? Mi diris, “Tio, kion vi faris tie, estis granda bono. Mi neniam vidis tian bonegan homon.”

Li ridetis.

“Kiel vi nomiĝas?” li demandis. Mi diris nomon, hejmlandon ktp.

Mi demandis la nomon de la sinjoro. Li respondis, “Mi ne havas nomon.”

“Tiuokaze,” mi diris, “devas esti Kompato.”

Li malridetis. Ni tiel marŝis. Marŝmarŝinte ni aliris homomalplenan ponton.

Ĉirkaŭe li rigardis. Neniu apude estis. Li diris, “Rigardu, foriru sen retrorigardi. Se iu ajn demandus, ĉu vi vidis min, diru, ke ne.

Mi komprenis la instruon.

El du aŭ tri poŝoj li eltiris kvin monujojn. Kvin! Inter la amaso estis la mia.

“Kiu estas la via?”

Mi indikis per fingro.

“Malfermu ĝin.”

Mi malfermis. Bonŝance, ĉiu mono estis interne. Mi metis ĝin en mian poŝon.

Li diris al mi, “Iru, Dio vin savu!”

Mi diris, “Dio... kaj vin kaj min kaj ĉiujn savu!”

Benu.

elmalajalamigis Donald R. Davis, Jr.



Ostap Viŝnja (1889-1956)

Sidas foje oldulo Svirid sur ŝtupo. Sidas li kaj rabotas salklikan branĉeton.

– Kiel status la aferoj, avĉjo? Bonsanon al vi!

– Bonan sanon ankaŭ al vi! Ĉu la aferoj? La aferoj bonstatus! La aferoj, kiel diris tiuj banditoj, – gut (1)!

– Ĉu ankaŭ la germanan vi, avĉjo, ellernis?

– Certe. Havis mi senperan kontakton kun la malamikoj – tial, do, mi ellernis.

– Kaj ĉu longe vi, avĉjo, kontaktis?

– Ne tro longe, sed pro tiu kontakto triopo dank'al mi rekte "ekkontaktis kun la tero". Enterigis oni tiun triopon en la kampeto... Kaj la tombon aranĝis, kaj la krucon starigis: sed kiam la niuloj revenis, mi kaj la krucon dishakis, kaj la tombon lasis laŭ vento... Por ke eĉ spuro ne restu de la aĉuloj. Ĉu vi volas la rakonton? Aŭskultu do.

...Faŝistoj proksimiĝis; senhomiĝis nia vilaĝo. Nur kelkaj maljunulinoj restis. Trafis ankaŭ mi sur alia bordo de la rivero, en la arbaro, ĉe partizanoj. Tagmanĝojn por la junuloj mi kuiris, la ĉevalojn paŝtis. Iam mi ekvolis vidi, kiu en mia ĥato (2) mastrumas – mi ja loĝis sole, kiel fingro. Foje, kiam jam preskaŭ noktis, mi

Zenitko

venis al la rivero, eliris la boaton el kanoj, ĝin eniĝis, navigis kaj descendis sur mian bordon. Descendis mi kaj poste per kuradetoj inter heliantoj, malantaŭ la stalo mi kamufligis en lapoj. Mi kamufligis kaj atendis. Kaj en la ĥato, kiel mi vidis, estis lumo, paroloj aŭdeblis, iu provis kanti.

Sidis mi, atendis: oni ekdormu, mi pensis, tiam mi akceptos iun decidon. Sufiĉe longe mi devis atendi. Kaj jen la elirpordo – knar'! – eliras triopo: du, kiel mi aŭdis, estis faŝistoj, sed la tria estis Panĉjo Nuĵnik (3), oni enoficigis lin kiel vilaĝestron. Lia patro estris vendejeton en nia vilaĝo kaj li, tiu nazmukulo, plorpete persvadis aligi lin en kolhozon. Kaj nun, vidu, vi-laĝ-es-tro! Eliris ili kaj direktis sin al la stalo. En subtegmento de la stalo mi havis iom da fojno... Do tien Panĉjo ilin kondukis noktumi, ĉar en la ĥato estis sufoko.

Ili grimpis en la subtegmenton kaj kuŝiĝis. Mi aŭdis, ke ili jam ekronkis. Tiam mi kaŝe el la lapoj piedpintis en la stalon. En miaj manoj estis fera forkego-tridento. Mi levis la ilon kaj ekpikis tra la plafono – unu-du-tri!

Ili ekjelpis tie, ekkriis:

– Was ist das? (4)

Kaj Nuĵnik:

– Hoj, savu nin! Iu de la planko pafadas per zenitko (5)!

Aha, mi pensas, hundinaj filoj, mia forkego ŝajnas al vi "zenitko", nu atendu ankoraŭ kio sekvos. Kuris mi al la bordo, enboatiĝis kaj al la alia bordo navigis. Post tri tagoj formortis la triopo: tiel oni diris en la vilaĝo. Mi trapikis iliajn ventrojn. Tiamaniere mi kontaktis kun la malamikoj.

– Kiom da jaroj vi havas, avĉjo?

– Mi eĉ ne scias! Aŭ sepdek naŭ, aŭ okdek naŭ. Ĉu eblas tion kalkuli? Mi memoras, ke estas naŭ, sed post kiom, mi jam forgesis.

– Do, vi eĉ ne ektimis – sola kontraŭ la triopo?

– Ĉu mi ektimis? He, homodia, milito estas mia kutima afero. Mi dum la tuta mia vivo batalis kontraŭ... mia edzino. Ĉu vi konis mian Lunjon? Ĉu tiaj bataloj similis al la lukto kontraŭ la fiaĉuloj en la stala subtegmento! Mi ja ilin kiel ratidojn mortpremis! Kaj mia mortinta edzino – Dian regnon por ŝi! – ja ŝi divizion kontraŭstarus per ligna forkego! Mi kun la kumo (6) – ankaŭ por li estu Dia regno! – eĉ duope... ne, ni ne povus kontraŭstari!

Sidas mi foje apud la tenejo, akriĝas dentojn de la rastilo kaj ŝi eniras la korton kaj diras kvazaŭ pafante:

– Svirid!

Kredu min, la toporo en miaj manoj mem – salt! salt! salt! Se kompari kun la moderna milittekniko, ŝi estis vera "katjuŝa" (7). Mi tiel bone ekzercis kun ŝi, ke por mi ajna milito estas bagatelo. Mian Lunjon, sincere dirante, mi ne atakis, kutime mi defendis min, sed la milito okazadis preskaŭ ĉiutage.

Foje, dimanĉe, mi kun la kumo, ankoraŭ antaŭ la preĝejo sonorado, ne eltenis – drinketis. Sufiĉe bone drinkis. Subite jen – Lunjo revenas el la preĝejo!

– Atenton, fraĉjo, – diras mi, – tuj batalo okazos! Se ni rezistos po unuope, ni estos batitaj. Ni kuniĝu kiel militaĉmento, alie okazos plena malvenko. Ŝi mueligos la militantojn kune kun la milittekniko!

Do, ni unuiĝis. Ŝi nur eniris la peronon, mi tuj kvazaŭ huratakis:

– Kial vi en la preĝejo ĝis tagmezo tumultas?! La popo regalas vin tie per mielo, ĉu?

Kaj la kumo de dekstra flanko iras. Sed ni faris organizon eraron: la forkegon ni ne kaŝis. Eĥ – kaptis ŝi la forkegon kaj ekis kontraŭatake! Disŝiris ŝi la fronton. Mi kun li retiriĝis al la antaŭe preparita pozicio – en la kelon. Ĝi estis kvazaŭ kontraŭatakejo. La varenikoj (8) jam malvarmiĝis, sed ŝi tutegale sieĝis nin en la kelo. Mi sidis malantaŭ barelo kun kvaso kaj dormetis.

La kumo diris:

– Vi restu, kie vi volas, sed mi, Svirid, al la miuloj traŝiriĝos. Ankaŭ mia Ĥristja hodiaŭ kuiris varenikojn.

– Rigardu mem, fraĉjo, – mi diras, – kaj agu laŭ la bontrovo. Sed vi ne risku tage kaj eku, kiam mallumiĝos.

– Kion vi diras, Svirid, "kiam mallumiĝos". Kiuj estos varenikoj en mallumo?

Li kruccignis sin kaj ekkuris X-direkten. Li sukcesis atingi la pozicion de sia Ĥristja. Kaj kvankam li estis kontuzita per la forkego, li restis staranta.

Kaj mi ĝis la vespero sidis ĉirkaŭumita malantaŭ la barelo kun kvaso. Nur dum krepusko Lunjo iom plipaciĝis: ŝi proksimiĝis, malfermis la kelon:

– Ĉu vi sidas? – ŝi diris.

– Jes, – mi respondis.

– Vi venu manĝi almenaŭ knelojn, alie vi febliĝos.

– Vi forĵetu la forkegon, – mi diris, – tiam mi eliros.

Brava estis la forpasintino!

Sciis ŝi kaj strategion, kaj taktikon. Ie ajn mi kun la parenco maskus nin – ĉu inter terpomoj aŭ en kanabo – ŝi trovis nin momente! Ŝi trovis kaj eligis! Kaj ŝi premis nin ĝis la



Ukraina ĥato (pentraĵo de Ilja Repin, 1880)

akvolimo, alivorte, ĝis la rivero. Kaj ni ambaŭ naĝi ne scipovis kaj staradis en la rivero je distanco de unu forkego. Staradis ni, malsekiĝis.

Kaj ŝi:

– Ĉu malsekiĝas?! Malsekiĝu vi, hundaj animoj, mi kanabaĵojn el vi draŝos!

Do, post tiu praktiko mi facile finvenkis la pedik-similajn fricojn (9).

Bedaŭrinde la kumo jam ne plu vivas: ni kune multon povus fari.

La kumo estis ankaŭ lerta piloto. Aso!

Skuis ni foje kun la kumo acidpomarbon. Grimpis ni sur la arbon kaj skuis ĝin. Kaj la arbo alta estis, multbranĉa. Faŝistoj malbenitaj forhakis ĝin. Lunjo en roborandon la pomojn kolektas. Skuis, skuis ni, – do, pensas ni, ni ekfumu. Ni la pipojn enbuŝigis, la kumo fajron eligis...

Kaj ŝi denove eksplodis:

– Denove vi pipojn fumas!

Tuj mi kun la kumo de sur la pomarbo kvazaŭ pikplonĝis. La kumo sukcesis surteriĝi, malgraŭ ke ne tuj, sed mi el pikplonĝo transiris al spiralfalo

kaj ne sukcesinte el ĝi elturniĝi, mi tramis ŝian jupon kaj falis surteren! Nur post duonhoro mi rekonsciiĝis, palpebrumis kaj rigardis: maldekstre staris la kumo, frotante la paneaĵojn, dekstre ŝtoniĝis Lunjo kun sitelo da akvo. Mi provis ekmoviĝi – la turnostiriloj, ĉu en brakoj, ĉu en gamboj, malfunkciis, la kajuto kaj la korpo de mia aviadilo estis tute malsekaj...

– Li estas vivanta, dank’al Dio, – diris la kumo.

Kaj Lunjo:

– Li estus vivanta, – ŝi diris, – se ne mia jupo. Li danku mian jupon, kiu retenis lin, – alie li enteriĝus ĝis la kilo! Eĥ vi, – ŝi diris, – bravaj pilotoj!

Kaj vi demandas min, ĉu mi ektimis tiujn tri hitleranojn?!

Post tiu trejnado?! Bone vi elpensis!

– Kaj nun kion vi faras, avĉjo?

– Revenis nia armeo kaj mi malmobiliziĝis. Tro rapide la germanoj fuĝis, mi ne kuratingus ilin. La pli junaj pelu ilin. Kaj mi nun por infanetoj el infanĝardeno fajfilojn faras. Tiom amuzaj estas la infanetoj! Samtempe mi prizorgas la

kolĥozan bovidaron, revenantan el evakuado. Necesas paŝti la gregon, necesas renovigi ĝin post la germana aĉularo. Eĥ, se vivus mia kumo, ni duope... Eble vi volas vidi mian “zenitkon”? Jen ĝi estas!

Kaj maljuna Svirid tenere karesis sian tridentan forkegon...

1944

Tradukis Mikaelo Linecki

- (1) ĥato – domo (kabano) en la ukraina lingvo
- (2) Gut (germane) – bone
- (3) Was ist das? (germane) – Kio ĝi estas?
- (4) Tiun familinomon oni povas elukrainigi kiel “bezonata ulo” aŭ “necesejo”
- (5) Zenitko – rusdevena vorto por kontraŭaviadila (tero-aero) kanono
- (6) Kumo – popola titolo, aplikata por la patro kaj la baptopatro de la bebo
- (7) “Katjuŝa” – karesa nomo por Katerina, samtempe – popola nomo de salva raketa minĵetilo
- (8) varenikoj – kune kun barĉo kaj lardo (salo), varenikoj estas vizit-karto de la ukraina kuirarto. Ili estas etaj pastokovertoj, triangulaj aŭ duonrondaj, farĉitaj per kuiritaj terpomoj, kazeo, acid-brasiko, viando, fazeoloj, fungoj, fruktoj aŭ beroj.
- (9) frico (germane Fritz) – moka nomo por germanaj nazioj

Gratule



La redakcio de *ESPERANTO USA* kore gratulas la bienon-lernejon Bona Espero okaze de la 50-jara jubileo! Gratulojn al ĉiuj volontuloj kaj subtenantoj de Bona Espero, aparte al Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia! Vivu kaj prosperu Bona Espero!

Korespondi deziras

Jean Claude B. IRAMBONA. Dzaleka rifuĝejo kampo. P.O. BOX 1530 Lilongwe, Malavio. Ret-adreso: irambonajc@yahoo.fr. Mi estas 35-jara viro, Esperanto-meznivelo. Intereso: Gardi georfojn kaj maljunulojn pri la paco de Dio. Mi estas pastro, mi loĝas en Malavio en la kampo de rifuĝantoj ekde 2000. Mi estas el Burundio. Mi estis edziĝinta. Malfeliĉe, mia edzino mortis. Mi havas filinon kiu aĝas nur 21 monatojn. Mi helpas al georfoj kies gepatroj mortis pro aidoso (AIDS) kaj maljunulojn kiuj ne havas fortojn. La vivkondiĉoj estas tre malfacilaj. Bonvolu helpi min daŭrigi ĉi tiun agadon en Afriko per Esperanto. Ni bezonas ludojn por georfoj, kovrilojn kaj monhelpon. Noto de EKS: Jean Claude, kaj aliaj loĝantoj de tiu regiono, ne havas komputilojn. Ili pagas [por ili] multekostan retkafejon por legi kaj skribi siajn mesaĝojn. Ili ankaŭ devas vojaĝi por atingi la retkafejon; respondoj malfruos. Bonvolu sendi mallongajn helpemajn mesaĝojn).

Laura VÁRADI. Budapest, Hungario. Ret-adreso: zuluka@citromail.hu. Mi estas 19-jara studentino, komencinta. Mi ŝatus fariĝi dentokuracisto. Intereso: ridi, babiladi, aŭskulti muzikon, ekskursi, ludi tablotenison, konatiĝi kun ĝejnuloj, legi, bestoj, maro, ventvelado, skiado, naturo.

Majid JAFARI. Tabriz, Azerbajĝano. Ret-adreso: ab5648li@yahoo.com. Mi estas 28-jara viro, studento, Esperanto-progresanto. Mi estas studento (Ph.D.) pri la angla literaturo en UM, Malajzio. Intereso: lingvoj, literaturo, kulturo, filmoj, sportoj, muziko.

Farley ALENCAR. Rua Pres. Vargas, 157, Salesianos, 63050-090, Juazeiro do Norte, Ceará, Brazilo. Ret-adreso: tiofarley@hotmail.com. Mi estas 40-ara viro, komencinto. Mi estas ekonomiisto.

Marek Bamperski. Glasgow, Skotlando. Ret-adreso: m_bamperski@yahoo.co.uk. Mi estas 44-jara pola esperantisto kiu nun loĝas kaj laboras en Glasgow, Skotlando. Intereso: lingvoj, geografio, vojaĝoj, historio, naturo, bestoj. Mi deziras trovi korespondamikojn.

Paco BERNABÉ. Lorca, Hispanio. Ret-adreso: angelbocazas@yahoo.es. Mi estas 32-jara viro. Mi estas fizik-studento kaj mi ŝatas la sciencan kaj lernadon de lingvoj. Mi ankaŭ multe ŝatas Japanion kaj la japanan kulturon. Eble mi vizitos Japanion. Ankaŭ plaĉas al mi legi, skribi, diboĉi kaj vojaĝi. Mi volas, precipe, korespondi kun japanoj, sed ankaŭ kun alilandanoj. Mia urbo, Lorca, estas en la sudorienta parto de Hispanio. Mi preferas ret-poŝton.

África FERRÁNDEZ MÉNDEZ. Alameda Cervantes, 1, 10Ŭ B. 30800 Lorca, Murcia, ES-Hispanio. Mi estas 30-jara virino. Mi estas filozofio-licenciulo kaj nun mi faras ekzamenon por esti instruistino de ŝtata lernejo. Mi ŝatas muzikon (roko kaj argentina tango), manĝi, trinki bieron sur teraso en sunaj tagoj, iri al strando (precipe per malnova aŭto, tre malrapide kaj fenestreto-malfermite), vojaĝi per kamioneto, kaj ilustritajn librojn por infanoj. Mi ŝatas ankaŭ la malbelegajn poŝtkartojn, ĉar ili estas tre amuzaj. Mia urbo estas en la sudorienta parto de Hispanio. Mi preferas paper-poŝton.

Alassane MBENGUE. BP/434, Rufisque, Senegal, Afriko. Ret-adreso: mbengue-boy@yahoo.fr. Mi estas 24-jara viro, Esperanto-meznivelo. Mi estas studento. Intereso: sporto, lingvoj.

Théo TROTOUIN. Tuluzo, Francio. Ret-adreso: thierry.trotouin@wanadoo.fr. Mi estas 13-jara knabo, komencanto. Intereso: libroj, sporto, komputiloj. Mi scipovas paroli la francan kaj la hispanan. Mi volas korespondi kun ĉilianoj, argentinanoj aŭ usonanoj.

Emese BUCZKÓ. Budapest, Hungario. Ret-adreso: bemy@freemail.hu. Mi estas 26-jara virino, komencinto. Mi laboras en biciklovendejo, kie oni vendas ankaŭ motorciklojn. Intereso: sportoj (biciklo, motorciklo), filmoj, babilado. Mi amas rigardi filmojn kaj konatiĝi kun homoj.

Marcos LÓPEZ. Avda. Portales del Peñón. Finca La Gloria, s/n. Alhaurín de la Torre, 29130. Málaga, Hispanio. Ret-adreso: cociendo_gambas@hotmail.com. Mi estas 20-jara viro, Esperanto-progresanto, studento pri tradukado kaj interpretado de la franca, germana kaj moderna greka. Intereso: lingvoj, klasika muziko, dancado, japanaj manĝaĵoj. Miaj pasioj estas lingvoj (precipe Esperanto) kaj klasika muziko (ĉefe piana). Mia celo estas fariĝi Esperanto-instruisto kaj disvastigi Esperanton tra la junularaj rondoj de mia urbo (kaj nuntempe mi sukcesas!). Mi korespondos retroŝte aŭ paperpoŝte.

Carl Mäsak. Studentv. 36:208. 752 34 Uppsala. SVERIGE (Svedio). Ret-adreso: cmasak@gmail.com. Mi estas 25-jara studento en Uppsala, Svedio. Uppsala situas ne malproksime de Stockholm, la ĉefurbo. Krom studoj, mi ankaŭ laboras, ĉefe per komputiloj. Intereso: lingvoj kaj lingvistiko, matematiko, komputilscienco, biologio, kantado, dancado, vojaĝoj kaj verkado. Mia Esperanto-nivelo estas meza. Mi ŝatus korespondi aŭ rete aŭ pa-

pere. Se iu volus helpi al mi ekzerci mian rusan, ĉinan aŭ francan, mi estus tre dankema. Sed mi ankaŭ volonte parolos nur Esperante.

Piotr Szatkowski. Krasnolaka 34 (urbo). 13-200 Dzialdowo, Pollando. Ret-adreso: szatkowskipiotr92@wp.pl. Mi estas 15-jaraĝa knabo. Intereso: geografio, historio, sporto, politiko. Krasnolaka estas malgranda vilaĝo en norda parto de Pollando. Mi tre ŝatus korespondi. Aĝo kaj sekso ne gravas. Mi korespondos per perpoŝto aŭ retroŝto.

Enrico LUCCA. Via Prestino 27, 22100 Como (CO), Italio. Ret-adreso: en.lucca@gmail.com. Mi estas 24-jara viro, komencanto. Intereso: lingvoj, filozofio, literaturo, poezio, vojaĝoj, kino, muziko, Orienta Eŭropo. Mi studas en Milano, sed mi loĝas en Como, tre bela urbo proksime de la limo inter Italio kaj Svislando. Mi preferas retroŝton.

Fernanda TORRES. Avenida Area Branca n 229, Rua Projetada Marli casa 16, Santa Cruz, Rio de Janeiro, RJ, Brazilo 23550-740. Mi estas 26-jara virino, komencanto. Mi estas studento. Intereso: filmoj, literaturo, sporto, promenado. Mi tre ŝatas legi kaj desegni.

Fabrcia TORRES. Avenida Areia Branca n 229, Rua Projetada Marli casa 16, Santa Cruz, Rio de Janeiro, RJ, Brazilo 23550-740. Mi estas 21-jara virino, progresanto. Mi estas studento. Intereso: literaturo, muziko, amikoj, filmoj, promenadoj, sportoj. Mi serĉas korespond-geamikojn.

André Luís AZEVEDO. Rio de Janeiro, RJ, Brazilo. Ret-adreso: cincinato@portugalmail.com. Mi estas 26-jara viro, meznivela esperantisto. Mi estas instruisto kaj agrikultura teknikisto. Intereso: agrikulturo, geografio, historio, vojaĝoj.

Tereza AZEVEDO. Porto Alegre, Brazilo. Ret-adreso: luno_7@yahoo.com. Mi estas 40-jara virino, komencinto. Mi estas instruistino. Intereso: muziko, legado, kulturo, filozofio.

El Esperanto Koresponda Servo
Por pliaj informoj pri korespondado aŭ publikigo de via propra anonco bv. viziti <http://members.aol.com/enrike/ekspeto.htm>

Kurackanto de la Indianoj Havasupajaj

Kanto de mortonto kiu esperas ricevi vivsubtenon de la ŝajna senŝanĝeco de la Tero.

Ruĝaj rokoj brunstriaĵe alte suprenimpetas ĉie ĉirkaŭ
nia hejmo. Ruĝaj rokoj alte suprenimpetas ĝuste tie ĉi.

Akvofonto ĉiam estos tie ĉi, ĉe rok piedo. De pratempe,
ĝi estas nia.

Ĝuste laŭ la mezo de nia lando, linio hele bluverda
sin movas.

Jen mia pensado: Akvorande, fragmitoj troviĝas.
Hele bluverda, ĉie ĉirkaŭas la akvo.

Jen mia pensado: Akvorande, ŝlimo formiĝos, turbulas, turbulas;
ŝlimo formiĝas ondetoforme.

Jen mia pensado: Insektoj akvosupraĵe glisas, glisas.

Jen mia pensado: Akvogresoj kreskas helbluverde,
svingiĝas, svingiĝas.

Jen mia pensado: Subakve troviĝas ŝtonetoj; super ili fluas
nia trinkakvo. La akvo glisas norden, malproksimen,
preter nia vido.

Jen mia pensado: Ni alvenis tien ĉi: Mi sidiĝas;
mi kantas al mi kanton.

Jen mia pensado: Kuraca Spirito, resaniganto. Mi samstatas.
Malbonan sanon.
Mi sidiĝas; mi kantas al mi kanton.
La aĵojn kiujn mi nomis, mi postlasas.

Jen mia pensado: Mi alvenis tien ĉi. Ni eliras la kanjonon.
Ekstere, kanjonrande, ĉevaloj miaj vagas apud la juniperarboj,
kaj la juniperarboj estas rektaj kaj malaltaj.
Ili estas ĝuste tie, ĉevaloj miaj kuniĝas tie.

Jen mia pensado: Ni alvenas tien, poste ni malsupreniras,
denove moviĝas inter la rokoj, blankaj rokoj brunstriaĵe.
Ĉe rok piedo, akvofonto ĉiam estos tie ĉi, resaniga
akvofonto ĝuste tie.

Miaj ĉevaloj trinkas la akvon kiu estas tie.
Blankaj rokoj brunstriaĵe, alte suprenimpetantaj, estas ĝuste tie.

Jen la pado de miaj ĉevaloj; ĝi zigzagas meze de rokoj,
polvokolora. Ĝi kondukas al la fonto. Ĝi estas
ĝuste tie. Tion mi pensas.

Kaj nun ni alvenas kanjonofunde, ĉe ruĝaj rokoj
kanjonofundaj. Ili estas ĝuste tie ĉi; tie ĉi mi
laŭmarŝas, mi senkompanie marŝas.

Jen mia pensado: Ruĝaj rokoj brunstriaĵe alte suprenimpetas.
Ili estas ĝuste tie ĉi, ĉe la rokobazo, ruĝaj rokoj,
ŝtonegoj brunstriaĵe.
Ili estas ĝuste tie ĉi.

Mia malsano sorbiĝas ĝuste tie ĉi.
Mi deziras ke tio okazu. Mi deziras ke tio okazu.

Trad. el la angla traduko el la havasupaja Agavo (Erik) Felker

Havasupajaj indianoj – (Havasupai) La Havasu 'Baaja (signifas “la-
homoj-de-la-blu-verdaj-akvoj”) estas amerikaj indianoj loĝantaj en
nordokcidenta Arizono. Tiu ĉi tribo estas konata kiel la solaj daŭraj
loĝantoj de la Granda Kanjono, kie ili loĝas dum pli ol 800 jaroj (el
Vikipedio).



Pri praktika mistikismo – en Esperanto!



H. Spencer Lewis

Havi prosperon en la vivo. H. Spencer Lewis. Tradukis S. Kärrefors. AMORC. 1998. 75 paĝoj.

Joel Amis

La vortoj “mistikismo” kaj “praktika” tradicie ne asociiĝas en la menso de multaj homoj. Ofte en la ĉiutaga lingvo, kiam iu nomas ion “mistika”, oni emas pensi pri io magia, neracia, religieca aŭ eĉ superstiĉa. Tamen tiu vulgara uzo de la vorto “mistika”, same kiel la misaj uzoj/komprenoj de la vortoj kiel *mistero*, *profana*, *okulta*

k.s., donas malĝustan impreson pri la vera signifo de mistikismo. En sia libro *Havi prosperon en la vivo* D-ro H. Spencer Lewis helpas al ni malkovri la praktikecon de mistikismo.

En la frua parto de la 20-a jarcento D-ro Harvey Spencer Lewis ricevis komision de la Rozkruca Ordeno en Eŭropo revigligi la Ordenon en Norda Ameriko. En 1915 li establis la Rozkruca Ordenon en Usono sub la oficiala nomo Antikva kaj Mistika Ordeno de la Rozkruco (AMORC). Kvankam ĉiam dum la jarcentoj de ĝia ekzisto la instruoj ĉiam emfazis praktikan aplikon de mistikaj principoj, D-ro Lewis utiligis modernajn rimedojn por diskonigi la rozkrucajn principojn al pli vasta publiko. Li tion faris per du ĉefaj manieroj: unue, li havebligis la rozkrucajn instruojn en skriba formo tiel ke homoj eĉ en izolitaj lokoj povu membri en AMORC kaj studi la rozkrucajn lecionojn; kaj due, per siaj multaj publikaj prele-

goj kaj libroj haveblaj al la ĝenerala publiko.

Siatempe la plej populara libro de D-ro Lewis estis *Havi prosperon en la vivo* (originala angla titolo: *Rosicrucian Principles for Home and Business*). Ĝi furoris kiam ĝi unue aperis en la malfruaj 1920-aj jaroj – kaj nun ĉi tiu klasikaĵo haveblas ankaŭ en Esperanto!

Sed, vi demandas vin, kion signifas praktika mistikismo? Tio simple signifas la aplikon de mensaj, spiritaj, psikaj kaj psikologiaj principoj al problemoj de la ĉiutaga vivo, ĉu en la hejmo, en interpersonaj rilatoj, en la laborejo ktp. En *Havi prosperon en la vivo* D-ro Lewis diskutas la temojn kiel, ekzemple, la krea povon de pensoj, bildigon de deziroj, kaŭzon kaj efikon, karmon k.a., kaj kiel apliki tiujn principojn por akiri novan postenon aŭ promocion, por pozitive influi homojn en la labora kaj persona vivo, por havi pli trankvilan kaj sanan vivon, kaj por efektiviĝi siajn

planojn. Kiel en siaj aliaj verkoj, D-ro Lewis alparolas la leganton en tre klara, konversacieca stilo, kun multaj konkretaj ekzemploj por ilustrati la principojn.

Eventuala kritiko pri la libro estas ke ĝi prezentas nur la plej elementajn rozkrucajn instruojn foje en iom simplisma maniero. Nu, respondo al tiu kritiko estas ke D-ro Lewis ja ne verkis la libron por spertaj esoteristoj kaj mistikuloj, sed por ordinarnaj homoj – tiurilate ĝi ja sukcesas. *Havi prosperon en la vivo* estas bona, facile komprenebla enkonduko al iuj el la elementaj principoj de Rozkruco kaj samtempe estas utila helpilo por tiuj, kiuj volas plibonigi iujn aspektojn de sia vivo.

<Legu>

Pliaj informoj pri Rozkruco troveblas ĉe <www.amorc.org>.

La libro aĉeteblas de ELNA.

La Gepatra Lingvo kaj Esperanto: Nedisigeblaj Lingvaj Rajtoj de Ĉiu Homo

“La gepatra lingvo estas kara al ĉiu el ni. En la gepatra lingvo ni eldiras niajn unuajn vortojn kaj esprimas niajn pensojn plej bone. Ĝi estas la bazo, sur kiu ĉiuj homoj disvolvas sian personecon de la momento kiam ili spiras sian unuan spiron, kaj ĝi estas tio kio subtenas ilin dum iliaj vivoj. Ĝi estas la rimedo por lerni respekton al si mem, al sia historio kaj al sia kulturo kaj, ĉefe, al aliaj homoj kaj al iliaj diferencoj.”

Per ĉi tiuj vortoj la ĝenerala direktoro de Unesko, Koïchiro Matsuura, malfermas la ĉi-jaran mesaĝon por la Tago de Gepatra Lingvo, kiu estas celebrata ĉiujare la 21-an de februaro. Ĉiu parolanto de la internacia, neŭtrala lingvo Esperanto certe aprobas ilin, ĉar la parolantoj de Esperanto scias pri lingvaj rajtoj, kaj ilia agado celas protekti tiujn rajtojn ĉie en la mondo rilate al ĉiuj lingvoj, grandaj kaj malgrandaj. Neniu lingvo, fakte, estas tro malgranda por ke oni malatentu kaj mistraktu ĝiajn malmultajn parolantojn. Ankaŭ ili estas homoj samvaloraj kiel ni kaj ankaŭ ili rajtas je respekto. Ilia kulturo ne estas portanto de valoroj malsuperaj al tiuj de aliaj kulturoj kiuj posedas la rimedojn por altrudi sin al ĉiuj.

Al la parolantoj de Esperanto apartenas ankaŭ la konceptoj, kiujn oni trovas en la deklaro, rilate al la graveco en la nuna mondo de harmonia kombino inter diverseco kaj identeco, kio en nia kampo signifas kombinadon inter gepatra lingvo kaj aliaj lingvoj bezonataj por komunikado kun aliaj komunumoj proksimaj kaj malproksimaj. Esperanto estas inter tiuj lingvoj la lingvo por

rilatoj internaciaj je regiona kaj monda nivelo. Esperanto ne celas anstataŭigi la naciajn kaj lokajn lingvojn. Tio estu klara al ĉiuj. La parolantoj de Esperanto celas protekti ĉies lingvon kaj ĉies identecon.

Eraras la defendantoj de lokaj lingvoj kontraŭ ŝtataj lingvoj. Ili vidas nur sian problemon, kaj persiste tute ignoras la danĝeron de pli grandaj lingvoj, kiujn ili eĉ bonvenigas. Kontraŭ tiuj ili certe ne povos rezisti en la posta generacio. Esperanto celas defendi ankaŭ iliajn rajtojn, kiel asertis Zamenhof, kiam li parolis pri la ebla utiligo de Esperanto en plurgentaj regnoj.

Eraras la defendantoj de naciaj grandaj kaj mezgrandaj lingvoj en Eŭropo kaj ĉie tra la mondo, kiuj vidas nur sian lingvon kaj sian kulturon kaj pensas ke ili povas sukcesi savi sin mem, eĉ se ĉiuj aliaj pereos. Ili nur revas resti kiel la dua plej granda lingvo en la mondo. Alianco inter ili kaj la parolantoj de Esperanto estus avantaĝa por ĉiuj.

Eraras la amas-komunikiloj, kiuj de tempo al tempo atentigas kontraŭ la ebla forigo de ĉiuj lingvoj fare de Esperanto. Ofte ne temas pri eraroj, ĉar tiaj akuzoj venas de homoj kaj komunikiloj el landoj kie oni parolas lingvon deklaritan internacia, kaj kiu grandskale respondecas pri la malapero de lingvoj kaj kulturoj en la



mondo nun.

Ni rediru nun tute klare: Esperanto estas nur dua lingvo por kontaktoj inter gentoj de malsamaj lingvoj, ĉiu el kiuj rajtas kontribui al la monda kulturo siajn konojn kaj siajn pensojn. En monda skalo nia riĉeco estas nia varieco, sed sen lingvo, kiun ĉiu same povas lerni facile kaj pro libera elekto, nur malriĉeco kultura kaj unuformeco tutmonda sekvos.

Esperanto ne havas armeon, kiu disvastigas ĝin. Esperanto ne havas ekonomiajn interesojn kiuj devigas homojn lerni ĝin. Esperanto ne havas kulturan industrion kiu volas disvastigi siajn produktojn koste de lokaj alilingvaj produktoj. Esperanto nur havas la forton de racio kaj de justeco, pro kiu ĉiam pli multaj homoj libervole elektas ĝin por riĉigi sian internacian vivon, por koni aliajn kulturojn, por kontribui al pli justaj internaciaj rilatoj.

Renato Corsetti,
(eks) Prezidanto de UEA

(El la Gazetaraj Komunikoj de UEA)

Esperanto League for North America
PO Box 1129
El Cerrito CA 94530

Non-Profit Org
US POSTAGE
PAID
Leesburg FL
Permit # 1040